La 11an de septembro 2016

Prelego de s-ro Nakaĵima el Fukuŝima

La 11an de septembro okazis prelego de s-ro Nakaĵima Takaŝi el la urbo Sooma en la gubernio Fukuŝima. Li havas malgrandan superbazaron de 30 jaroj en Sooma, sed pro la nuklea akcidento li suferas multe.

Li estas la ĉefreprezentanto de la akuzantaro konsistanta el 3865 homoj. Ili postulas, ke TEPCO kaj la registaro “redonu la vivon kaj la regionon”.

Ĉu ni povas permesi, ke TEPCO kaj la registaro forĵetu nin kaj Fukuŝima-n?

Nun en Fukuŝima ni, 3865 suferantoj pro la nuklea akcidento, batalas kontraŭ TEPCO kaj la registaro en la juĝejo, postulante, ke ili redonu al ni la eksan vivon kaj la eksan regionon. Multaj el ni ne plu povas aŭ ne plu volas loĝi en sia urbo kaj translokiĝis al fremdaj lokoj. Komercistoj devis nove trovi klientojn, kaj laboristoj devis trovi novan laborejon tie, sed tio estis tre malfacila. La gubernio donas po 60000 enoj (600 eŭroj) al tiuj rifuĝintoj kiel subtenon por loĝejo, sed tio estas la sola subteno de la gubernio kaj la registaro. Tiuj rifuĝintoj devas memstare sin vivteni.

Perdita maro

Mi havas malgrandan superbazaron en en la urbo Sooma de 30 jaroj. Mi loĝas iom fore de la nuklea centralo, do mi ne translokiĝis. Antaŭe mi estis fiera pro tio, ke mi vendas la plej bongustan *saŝimi* (krudan fiŝaĵon, foto) en mia urbo. Por fari bongustan *saŝimi*-on, ni devas kombini diversgustajn kaj diverskolorajn fiŝaĵojn, ekzemple salmon, tinuson, salikokon, platfiŝon ktp. La maro de Sooma estas fekunda pro akvo enfluanta el la montaro Abukuma. Dank’ al tiu fekunda maro fiŝoj estas tre bongustaj. Precipe bongustaj estas platfiŝoj. Ni ĝuis benon de tiu naturo.

Longe oni ne povis kapti platfiŝojn pro radioaktiveco, sed ekde la 1a de septembro estis permesite kapti ilin. Tio estas eble bona novaĵo, sed kiam mi rekomendas tiun platfiŝon al miaj klientoj, certe okazas jena konversacio:

Kliento: Ĉu vere tiuj platfiŝoj estas sekuraj?

Mi: Jes, ĉar la gubernio ekzamenas ĉiujn fiŝojn kaj garantias, ke ili estas sekuraj.

Kliento: Tamen oni mezuras nur cezion, ĉu ne? Kiel estas aliaj nukleaĵoj kiel stroncio?

Mi: Tion mi ne scias.

Kliento: Do mi ne aĉetos.

Tiamaniere konversacio finiĝas, kaj mi ne povas plu rekomendi tiujn fiŝojn pozitive.

Nun mia filo kuiras *saŝimi*-on anstataŭ mi, ĉar mi ne estas hejme, laborante por la juĝado kaj prelegante en diversaj lokoj. Dum la pasintaj 4 jaroj, li progresis multe en *saŝimi*-kuirado, sed lia *saŝimi*, laŭ mi, ne estas inda je aĉeto. Platfiŝaĵo ludas gravan rolon en *saŝimi*, sed nun li devas uzi kultivitajn platifiŝojn nutritajn per sardinoj, do la viando gustas sardineca, tute malbongusta. Foje li povas aĉeti naturajn platfiŝojn kaptitajn en aliaj gubernioj, sed ili ne estas freŝaj. Antaŭ la nuklea akcidento, mi povis aĉeti freŝegajn fiŝojn laŭ la mendo de klientoj, sed nun tio ne eblas.

Unu jaron post la nuklea akcidento, oni prove kaptis polpojn, kaj mi rekomendis la pecon al juna patro kun bebo. Tamen li rifuzis, dirante, “Mi povus manĝi ĝin, sed mi ne povas doni ĝin al mia filo”. Mi neniam forgesas liajn vortojn.

Sed la registaraj oficistoj diras, ke ni forgesu la akcidenton. Iu profesoro eĉ diradas, ke ni ne timu elmetiĝon de 100 milisivertoj, kaj li estas moke nomata “s-ro 100 milisivertoj”. Internacie oni akceptis 1 milisiverton jare kiel la maksimuman kvanton da elmetiĝo por ordinaraj homoj kaj faras leĝojn laŭ tiu konsento. Ĉu fukuŝima-anoj jam havas imunecon kontraŭ 100 milisivertoj? Tute ne, do mi komprenas la opinion de tiu juna patro. Estas natura sento, ke oni evitas danĝerajn manĝaĵojn.

Forgesu kaj ne timu

Sciencistoj kaj kuracistoj ne scias, kiomgrade danĝera estas malaltnivela nuklea elmetiĝo. La registaro kaj TEPCO diras, ke ĉar ni ne scias, ni ne timu. Sed kontraŭe, ni timas, ĉar ni ne scias, kaj el tiuj nescio kaj timo fontas nia sufero.

La registaro kaj iuj estraranoj de fiŝada kooperativo kritikas min, dirante: “Jam pasis 5 jaroj. Por forviŝi malbonan famon de Fukuŝima kaj por restarigi la gubernion, ni ne plu parolu pri la sufero de Fukuŝima. Ni klopodas por tio, sed vi, Nakaĵima, subfosas nian klopodon, fanfaronante suferon de Fukuŝima” kaj “Ne timante radioaktivecon, manĝu, trinku kaj ĝuu la vivon. Tio estas laŭdinda sinteno de homoj, kiuj amas Fukuŝima-n kaj Japanion”.

En junio la registaro decidis nuligi malpermeson de loĝado en lokoj, kiuj estas poluitaj je malpli ol 20 milisivertoj. Tuj poste TEPCO klarigis, ke ĝi ne plu donos kompensan monon al la rifuĝintoj ekde aprilo 2017, kaj preskaŭ samtempe la gubernio Fukuŝima deklaris tranĉon de porloĝadan helpmonon de 60000 enoj al 30000 enoj en 2017 kaj al 20000 enoj en 2018 kaj pli poste ĝi ne helpos.

Tiu mono multe helpas la rifuĝintojn. Certe ges-roj Tanĵi, kiuj rifuĝis ĉi tien, ricevas tiun helpmonon.

S-ino Tanĵi el la partero: “Ni ne ricevas!”

Eĥ, vi ne ricevas tiun monon! Laŭdinde! Vi havas fieron kiel sinceraj homoj! Tamen por multaj homoj estas malfacile vivi sen tiu helpmono. Sen ĝi multaj rifuĝintoj vole nevole devos reveni al sia hejmurbo. Tiamaniere la registaro trudas al ili revenon al la eksa urbo. Sed ĉu ili povos reveni?

Al la urbo Naraha, en kiu homoj nun rajtas loĝi, nur 7% de la loĝantoj revenis. Plejparto de tiuj revenintoj estas homoj pli ol 60-jaraj kaj kapablaj uzi aŭtomobilon. Neniu familio kun malgrandaj infanoj revenis. Al tia urbo komercistoj ne povas

reveni, ĉar ili ne povos vendi varojn al aproj. Junaj gepatroj timas malsaniĝon de siaj infanoj pro radioaktiveco. Ĉu ili povos reveni al la loko poluita je 20 milisivertoj?

En hospitaloj radiografoj kaj en universitatoj esploristoj pri nukleaj aferoj devas sekvi severajn regulojn. Ili povas elmetiĝi al 5,2 milisivertoj jare, sed kiam ili laboras pri radioaktivaĵoj en la laborejo, ili nek manĝi, nek trinki, kaj kiam ili eksteren iras, ili devas demeti ĉiujn vestaĵojn, kaj nenion ili povas kunporti eksteren. Kiam la registaro trudas al la rifuĝintoj revenon al la loko poluita je 20 milisivertoj jare, tio signifas, ke ili devas loĝi en loko 4-oble pli poluita ol en tiuj esplorejoj kaj radiografejoj. La ĉefministro mem loĝu en la loko poluita eĉ je 100 milisivertoj jare, sed mi ne povas akcepti tiun kontraŭleĝan trudon.

Iam mi demandis la registarajn oficistojn, ĉu ili intencas nuligi tiun leĝon, kaj la respondo estis “Ne”. La registaro, kiu devas observi la leĝon, mem agas kontraŭleĝe. Tio signifas, ke por la registaro ekonomio estas pli grava ol la vivo de fukuŝima-anoj. Ili pensas, ke japana ekonomia progreso estas pli grava ol morto de 100 mil fukuŝima-anoj. Tiu sinteno de la registaro estas kvazaŭ glavo direktita al la popolanoj, ne nur al la fukuŝima-anoj. La registaro pretendas, ke ĝi protektas la japanojn, sed samtempe intencas funkciigi ĉiujn reaktorojn. Se okazos aliaj akcidentoj, ĝi neglektos kaj forĵetos la suferantojn same kiel en Fukuŝima. Nun ni lernas tiun lecionon kaj fariĝas pli saĝaj.

En aprilo tiun ĉi jaron okazis grandaj tertremoj en la gubernio Kumamoto kaj detruis la faman kastelon. Iuj el miaj konatoj konfesis, ke ili perdis kuraĝon plu vivi, vidante la detruitan kastelon. Neniu antaŭsupozis tiujn du tertremegojn kun la forteco de 7 gradoj. En 1995 okazis granda tertremo en Koobe kaj la urbo detruiĝis, kaj en 2004 okazis granda tertremo en la gubernio Niigata kaj difektis la nuklean centralon en la gubernio. Ankoraŭ nun TEPCO pledas, ke la nuklea akcidento en Fukuŝima okazis pro neantaŭsupozebla tertremo, sed nun en Japanio, situanta sur la nestoj de tertremoj, iam ajn okazos “neantaŭsupozeblaĵoj”. Tial la elektraj kompanioj kaj la registaro devas fari ĉiajn rimedojn por eviti gravajn akcidentojn, sed ne farante tion, ili provas funkciigi plej multajn reaktorojn. En Fukuŝima la registaro intencas finigi la akcidenton en 5 jaroj. Tio fariĝos bona ekzemplo por aliaj eventualaj akcidentoj. Suferontoj ne plu povos ricevi helpon de la registaro 5 jarojn post la akcidento laŭ la modelo de Fukuŝima.

Nia batalo

Ni batalas en la juĝejo, sed ankaŭ ekster la juĝejo. Juĝistoj estas elitaj homoj. Certe ili havas kompaton pri la suferantoj, sed se ili verdiktos kontraŭ la registaro, ili ne povos promociiĝi al pli alta posteno. Ili estas homoj, do ŝanceliĝas. Por subteni ilin, batalo ekster la juĝejo estas tre grava. Ni faras du agadojn.

Unua agado estas kolekti multajn akuzantojn kaj subtenantojn, kiam okazas juĝado. La ĉambro de la juĝejo ricevas nur 50 homojn, sed ni kolektas pli multajn kaj manifestacias ekster la juĝejo. Komence kolektiĝintaj homoj estis 150, sed poste 200, pli poste 250, kaj nun kolektiĝas 400 homoj. Oficistoj de la juĝejo kalkulas la nombron. Certe ili informos la ĵuĝistojn pri la nombro. Dum la juĝado tiuj, kiuj ne povas eniri en la juĝejan ĉambron, kolektiĝas en alia konstruaĵo kaj lernas. Ni invitas famajn ekonomikiston, filozofon kaj esploriston kaj aŭskultas iliajn prelegojn. En la ĵurnaloj en la sekva tago aperas novaĵoj pri la juĝado. Tiamaniere ni kuraĝigas la ĵuĝistojn por ke ili ne ŝanceliĝu kaj verdiktu laŭ sia konscienco.

Alia agado estas vizito al diverskampaj asocioj. Ni jam vizitis 200 asociojn. Fukuŝima estas konservativa gubernio, do loĝantoj emas pensi, ke la akuzantoj estas strangaj homoj, senrespekte kontraŭstarantaj la registaron. Troviĝas Asocio de la entreprenistoj en Fukuŝima, kiun ni vizitis kaj demandis, ĉu la asocio akceptos la proponon de TEPCO, ke ĝi finos doni kompensan monon al la komercistoj kaj kompanioj post du jaroj. La estraranoj de la asocio nun komprenas nian pledon. Tio estas eta sed certa sukceso.

Ankaŭ en Gunma okazas juĝado pri la akcidento de Fukuŝima en la juĝejo de Maebaŝi (la ĉefurbo de Gunma) kaj dum la juĝado ni sukcesis persvadi la juĝistojn viziti la regionon damaĝitan de la nuklea akcidento. Tie ili vidis kaj sentis la mizeron kaj suferojn pro la nuklea akcidento. Ili vizitis senhomajn urbojn kaj vilaĝojn, vidis putrintajn domojn kaj fabrikojn, kaj sentis malĝojon de bovistoj, kies bovinoj postlasite mortis kaj skelete vicis en la bovinejo. Certe la juĝistoj komprenis la kulpon de TEPCO, rekte vidante la realon. Poste ankaŭ juĝistoj en la gubernio Ĉiba kaj en Fukuŝima vizitis la damaĝitajn urbojn. Certe aliaj juĝistoj en aliaj 24 juĝejoj sekvos la ekzemplojn de tiuj tri juĝejoj. Mi kredas, ke per niaj klopodoj ni sukcese haltigas ilian ŝanceliĝon.

Batalo por demokratio

Antaŭ du jaroj mi estis invitita de protestanta eklezio en Frankfurt, Germanio. Post kiam mi prelegis pri la nuklea akcidento al 150 gelernantoj de supera mezlernejo, instruistino, kiu prezidis la prelegkunsidon, diris: “Nun estas tempo por diskutado. Komence mi demandas vin, kial oni konstruis la nuklean centralon en Fukuŝima”. Mi jene respondis.

“Ĉar la marborda regiono estis malriĉa kun malmultaj loĝantoj. Eĉ se grava akcidento okazos, suferontoj aŭ mortontoj estos maksimume 100 miloj. Se okazos akcidento en Tokio, povos suferi aŭ morti 10 milionoj da homoj. Por ekonomia progreso, morto de 100 mil homoj ne gravas. La vivo de fukuŝima-anoj estas malpli valora ol tiu de Tokio-anoj. Do dekomence konstruado de nukleaj centraloj en Fukuŝima atencis homan rajton, ke ĉiuj homoj estas egalaj. Ĉu vi akceptos tian argumenton?”

Se instruistoj organizus tian kunsidon en Japanio, tuj venus kritiko de gepatroj. Ili opinias, ke tiuj instruistoj estas “ruĝaj”, kaj iuj telefonos al la eduka komitato. Mi demandis miajn konatajn instruistojn pri la ebleco de tia kunsido en ilia lernejo, kaj ĉiuj negative respondis. En la japanaj lernejoj estas tre mafacile trakti politikajn aferojn.

Nia batalo komenciĝis por protekti nian vivon kaj rajton, sed ĝi, evoluinte, celis haltigi kaj nuligi ĉiujn nukleajn centralojn, kaj nun ni celas ŝanĝi maldemokratian politikon. La batalo daŭras, ne nur en Fukuŝima, sed ankaŭ en Maebaŝi kaj en la tuta Japanio, do ni kunlaborante progresigu nian batalon.

Koran dankon pro via aŭskultado.

Ridinda rakonto

Poste okazis diskutado. En ĝi s-ro Nakaĵima rakontis pri “ridinda vivo de posedantoj de fiŝkapta ŝipo”. Vere la rakonto estis ridinda, sed samtempe plorinda. Jen la rakonto:

Posedantoj de granda fiŝkapta ŝipo ricevas kvantegon da kompensa mono, ĉar ili ne povas fiŝkapti. Ili kaj iliaj familianoj ne bezonas labori. Iu filo, kiu antaŭe laboris kiel fajrobrigadano, ĉesis labori kaj nun posedas aŭtomobilon, kiu kostas 20 milionojn da enoj (200 mil eŭrojn). Iliaj edzinoj nun ne havas laboron, kaj nur manĝas bongustaĵojn, do ili dikiĝas. Por sia sano ili komencis viziti gimnastikejon, vestante sin per multekosta sportokostumo. Ordinaraj homoj ne volas proksimiĝi al ili, do ĉesis viziti ĝin, sed tio tute ne gravas por la gimnastikejo, ĉar multaj tiaj dikaj virinoj kolektiĝas tie.

Ankaŭ posedantoj de malgrandaj ŝipoj ricevas kompensan monon, sed la sumo estas malgranda, do ili volas komenci fiŝkaptadon plej frue, sed posedantoj de granda ŝipo ne volas tion. Ju pli longe ili ne povas fiŝkapti, des pli longe kaj des pli multe ili povas ricevi tiom grandan kompensan monon. Ili dankas al la nuklea akcidento kaj ne volas ŝanĝi nunan “bonan” situacion. Tiuj homoj oficas kiel estraranoj de fiŝkaptista asocio.

Laŭ proverbo, mono kaŭzas ĉion malbonan. Tio estas prava por tiuj fiŝkaptistoj. En Fukuŝima okazas diversaj malharmonioj pro mono: iuj ricevas multe, iuj malmulte, iuj tute ne, laŭ kategorio farita de TEPCO kaj la registaro.